



Ni preparas por vi la Gebeneluksan Kongreson

ESPERANTO EN MARCHÉ

ni faris

JUNULARA E-SEMAJNO
BEST-STUDSEMAJNFINO

ni faras

EKSPOZICIO KONTRAŬ MILITO

ni faros

PEKO
GEBENELUKSA KONGRESO



Revue trimestrielle belge

PRINTEMPS 2025 - N°1

Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

Devenir membre / Membrigi

MEM (membre > 25 ans + revue) 30 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 15 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 15 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

BE33 5230 8132 1946 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Yves Nevelsteen 0472 106 086 yves.nevelsteen@gmail.com
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Contenu / **Enhavo**

Ĉeestindaj aktivaĵoj - 4
Ĉu vi venos al PEKO? - 5
Intervjuo kun Lulu el Turkio - 6
La kunvenoj en Lieĝo - 7
Zamenhofa festo: raporto - 8
BEST estis sukceso - 10
JES en Ferrières - 12
La pezo de rankoro - 13
Novaĵoj el Esperantujo - 14
Homonomoj kaj paronomoj - 16
Inspiraj rakontoj - 18

Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité
par l'asbl Espéranto
Wallonie - Rue de la
Terre Franche, 33 -
5310 Longchamps.
Rédacteur en chef :
Jean Annet
Rédaction et mise en
page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun
Communications à Strée



Éditorial **Antaŭparolo**

Saluton al ĉiuj,

Le monde dans lequel nous vivons actuellement est dingue !

Dans mon dernier édito, je nous avais souhaité une année 2025 plus paisible que celle de 2024. Force est de constater que c'est mal parti. On n'a jamais parlé autant de guerres. Les grandes puissances musclent leurs armes, et l'Europe...

L'Europe se reconstruit, se rassemble, essaie de faire poids. Mais ce qui fait la puissance de l'Amérique, de la Russie, de la Chine vient de différents facteurs dont celui de parler la même langue. La Chine ; 1,5 milliard d'habitants, les Etats Unis ; 350.000, la Russie : 150.000. Si des firmes comme Google, X, Apple, META, Microsoft ont atteint une telle puissance, sans compter les firmes chinoises, c'est parce que ses adhérents parlent la même langue. L'Europe ; 450.000 d'habitants. Quelle puissance pourraient avoir des firmes analogues européennes si l'Europe avait une langue commune. Quel gain de temps, d'argent, de modes d'emploi (...) pourrions-nous avoir si le rêve de Zamenhof prenait corps. Pour cela, évidemment, il ne faut pas s'attendre à quelque chose de nos politiques. Nous ne pouvons compter que sur nous-mêmes. Quand on voit le buzz que peuvent faire des influenceurs sur les réseaux sociaux, on se dit qu'il ne suffirait qu'une étincelle, un buzz européen sur l'espéranto.

Allez, on y croit !

Jean ANNET

Ĉeestindaj aktivaĵoj

Des activités d'espérantistes à découvrir



La 27-an de aprilo esperantistoj partoprenos en la **Tago de la Flandraj Ardenoj** kaj prezentos Esperanton. Venu malkovri unu el la plej belaj regionoj de Flandrio. Antaŭtagmeze ni promenos - provizu vin per botoj aŭ fortikaj, altaj ŝuoj! Tagmeze ni piknikos en Louise-Marie. Posttagmeze ni vizitos la Protestantan Muzeon en Horebeke.

Tri bonaj kialoj por partopreni:

- Unu. Malkovru naturon kaj kulturon de bela regiono dum la plej bela sezono.
- Du. Apogu lokajn naturasociojn kiuj protektas ĉi tiun regionon.
- Tri. Montru, ke ekzistas vivanta Esperanto.

Informoj: <https://eventaservo.org/e/fa25>

Limburga Esperanto-Asocio invitas vin la 27-an de aprilo al nova **Limburga Tago**. Ĉi-foje ili vizitos la belan regionon “Fruitstreek” (frukta regiono). Espereble je la fino de aprilo, la arboj abunde floros. Oni planas admiri ilin bicikle aŭ piede. Informoj: <https://eventaservo.org/e/lt25>

La 3-an de majo la Internacia Esperanto-Instituto en Hago (NL) organizos **renkontiĝon en la Cseh-Domo** kun vizito en muzeo Panorama Mesdag kaj Centro de Vizitantoj de Palaco de Paco. Informoj: <https://eventaservo.org/e/th25>

La **Printempa Semajno Internacia** estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ Pasko ie en Germanio. Por la 41-a PSI, kiu okazos de la 14-a ĝis la 21-a de aprilo, la organizantoj atendas ĉirkaŭ 100 partoprenantojn el diversaj landoj, kiuj konsistas precipe el familioj kun infanoj kaj junuloj. PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena. Samtempe kun PSI en Germanio okazos NEMO, renkontiĝo por interkonatiĝo de novaj Esperanto-parolantoj de la meza generacio! <http://psi.esperanto.de/>

LA rencontre du printemps en Belgique

Ĉu ankaŭ vi venos al PEKO?

Après un PEKO mémorable en 2023 où nous avons fêté les 10 ans des Verdaj Skoltoj. Et une année 2024 sans PEKO (nous étions au congrès européen à Strasbourg). PEKO revient pour la onzième fois ! Du 16 au 18 mai au Centre d'Hébergement de Tilff.

Cette année Camille Berger s'occupe du programme. En plus des classiques cours d'espéranto, conférences et ateliers, nous organiserons une visite de la mine de Blegny, et le deuxième concert du duo belge Mezbakita ! Leur premier concert est disponible sur Youtube : <https://mallonge.net/mezbakita>

C'est Valère et Tom qui s'occuperont de cuisiner pour nous. Ils suivent des cours de cuisine depuis septembre spécialement pour l'occasion.

PEKO, c'est la meilleure occasion pour montrer le mouvement espéranto et les Verdaj Skoltoj à vos petits enfants : invitez-les pour une initiation à l'espéranto, un atelier, un concert ou le week-end complet !

Info et inscriptions : <https://verdajskoltoj.net/2025peko/>

Valère DOUMONT





Interview

Intervjuo kun Lulu el Turkio

Kiu vi estas? Mi nomiĝas Lulu. Mi uzas la pronomon « ri » en Esperanto. Mi naskiĝis en Turkio, sed mi konsideras min sennaciulo kiel civitano de la mondo. Antaŭ kelkaj monatoj mi venis al Belgio pro laboro. Mia profesio estas inĝenierio de programaro.

Kial vi lernis Esperanton? Kvankam lingvistiko ĉiam interesis min pli ol ĉiuj aliaj fakoj, mi ne elektis studi ĝin en universitato pro zorgoj pri oportunoj de dungado. Malgraŭ tio ĝi restas mia plej amata ĉevaleto. Mi anstataŭe studis komputadan inĝenierion. Pro mia intereso mi ek esploris artefaritajn lingvojn, kiam mi estis liceano. Tiam mi preterlasis Esperanton, ĉar mi rigardis ĝin malaktuala kaj tro simila al latinidaj lingvoj. Tial mi lernis aliajn artefaritajn lingvojn kiel Lojbanon kaj Tokiponon. Neniu el ili tre plaĉis al mi pro tio, ke ili ne estis oportune uzeblaj por ĉiutaga parolado pri malsimplaj temoj. Mi eklernis Esperanton dum la pandemio pro libertempo post diplomiĝo. La kialo por ŝanĝi mian opinion pri Esperanto estis tio, ke reformoj en Esperanto akiris subtenon. Reformoj estas signo de vivanta lingvo, kiu daŭre adaptas sin al la estanteco. La pronomo «ri» estas unu el tiuj reformoj, kiu tre populariĝis inter junaj Esperantistoj en interretaj komunumoj, reflektante nunajn sociajn tendencojn.

Post kiam mi eklernis Esperanton, mi enamiĝis al ĝi pro ĝiaj logika gramatiko, riĉa esprimpovo kaj afabla parolantaro inter aliaj. Studo de Esperanto fariĝis unu el miaj ŝatokupoj.

Pri la Esperanto-movado? Esperanto estas unika inter lingvoj pro sia Interna Ideo. La lingvo estas strikte ligita al la movado, kiu havas siajn proprajn principojn. Celo de tutmondaj paco, interkompreno kaj konkordo estas la kerno de la movado. Esperantistoj do emas esti kompatemaj kaj progresemaĵoj. Tiu agrabla etoso en la movado tre plaĉas al mi. Malkiel multaj aliaj lingvaj akademioj, la Akademio de Esperanto tenas sin kiel gvidanto — ne kondukanto — de la parolantoj. La parolantoj mem kondukas la lingvon, kaj la Akademio priskribas la vivantan lingvon, kiel oni ĝin parolas. Ankaŭ tiu homcentra sinteno plaĉas al mi.

Kion vi proponus? Ekzistas pretervola disfendo inter junaj Esperantistoj, kiuj plejparte interparolas enrete per babilejoj, kaj maljunaj Esperantistoj, kiuj plejparte interparolas proprapersonale dum kunvenoj. Eĉ la parolmanieroj diverĝas. Laŭ mi estus tre bone, se la du iel kuniĝus, por ke la Esperanto-kulturo ne malvastiĝu.

Intervjuis Catherine ROYAUX

Les rencontres «Toutes directions»

Lieĝa grupo provas kunlabori en ĉiuj direktoj

La intereso kaj niveloj de la klubanoj varias kaj ni provas kontentigi ĉiujn. Nia grupo kunvenas unu mardon monate posttagmeze en la “Maison de la laïcité de Esneux”. Ni manĝas, trinkas kaj praktikas la lingvon. Dum la lastaj renkontiĝoj ni tradukis al Esperanto la tekston proponitan de Freddy kaj Nicole pri la “Nigra karnavalo” aŭ karnavalo de Hoûres, kiu kunfratigas la vilaĝanojn de Eben-Emael ĉiujare (artikolo trovebla en nia retejo). Ekde pli ol 120 jaroj, la komunumo de Esneux festas ĉiujn kvin jarojn la arbojn. En 1906, bela poemo de Oscar Colson estis gravurita sur bronza plakedo, videbla proksime de la preĝejo de Esneux.

Eliane, kun helpo de la grupo, preparis tradukon de la poemo en Esperanton kaj en la valonan lingvon, por publikigi ĝin en regiona gazeto.

En kunlaboro kun 4 aliaj kulturaj asocioj Eric venigis la ekspozicion “Rezisti al la milita propagando” de la War Heritage Institute en Lieĝo. Tiu ekspozicio prezentas la ideojn priskribitajn en la libro de la emerita profesorino Anne Morelli “10 principoj de milita propagando”. Dum la inaŭguro la 15-an de marto ankaŭ prelegis profesorino Anne Morelli. Ĉeestis pli ol 100 personoj inter kiuj tri esperantistoj.

Qui que vous soyez, les arbres ont abrité

Kiu ajn vi estas, la arboj ŝirmis

Vos jeux d'enfant, vos amours de jeunesse,

Viajn infanajn ludojn, viajn junularajn amojn,

Votre repos bien gagné.

Vian bone merititan ripozon.

Ils ont vu toutes vos joies, toutes vos peines,

Ili vidis ĉiujn viajn ĝojojn, ĉiujn viajn malĝojojn,

Ils demeureront encore quand vous aurez passé,

Ili ankoraŭ restos kiam vi preterpasos,

Pour donner leur ombre, leurs fleurs, leurs fruits

Por doni sian ombron, siajn florojn, siajn fruktojn

A ceux qui viendront après vous.

Al tiuj, kiuj venos post vi.

La 22-an de marto, la grupo de Lieĝo, kiu ankaŭ kunvenas unu sabaton ĉiumonate matene en “Toutes directions” aŭskultis tekston de Esperanta retradio proponita de Richard; kaj poste ili vizitis la ekspozicion en la kinejo Sauvenière. Dank' al la laboro de Philippe, la ekspozicio estos ankoraŭ videbla en la franca kaj nederlanda lingvo en la ateneo en Huy de la 18-a ĝis la 25-a de aprilo, kun inaŭguro la 18-an posttagmeze. Rigardu en Eventa Servo kiam okazos vizito por esperantistoj. La ĉiĉeronoj en la franca lingvo estos la 18-jaraj lernantoj de la lernejo. La ekspozicio estos ankaŭ videbla dum la Gebeneluksa Kongreso en Schleiden (3-5 oktobro 2025).

Fête Zamenhof 14/12/24 à Lessines

Okazis mirinda Zamenhofa festo en Lessines

Ĉi-jare, tiu ĉi tradicia nacia renkontiĝo estis proponita de V-Esp.o, kaj zorgeme organizita de ĝia prezidanto Jean Annet.

Partoprenis 67 esperantistoj, kiujn oni akceptis en vasta restoracio, tuj apud la muzeo de la hospitalo “Notre-Dame à la Rose” en Lessines.

Ni komencis la ceremonion, kun aperitivo en la mano, aŭskultante la aranĝojn planitajn de gvidantoj de esperantistaj grupoj: Jean (V.Esp-o), Valère (Verdaj Skoltoj), Yves (BEF) kaj Piet (FEL). Eric kantigis nin kaj invitis nin al ekspozicioj “Rezisti la militan propagandon”; An kaj Marilyn parolis pri planoj por la evento Promenado laŭ la Skeldo – intertempe la planoj konkretiĝis, vidu <https://mallonge.net/skeldo25>).

Tiam naŭope ni sidis ĉirkaŭ granda ronda tablo por ĝui bonegan tripladan menuon. Nenio mankis, eĉ vino kaj trinkaĵoj estis senpagaj.

Inter la ĉeestantoj estis grupeto el Verviers, pluraj komencantoj el Huy kaj Namur, kaj kelkaj gejunuloj, kiuj profitis la okazon renkontiĝi ĉirkaŭ tablo.

Lode deĵoris ĉe la libroservo. FEL kunportis multajn librojn!



Post la tagmanĝo, la vizito al la malnova hospitalo estis organizita en du grupoj, laŭ la gepatra lingvo: la franca aŭ la nederlanda. Herman Deceuninck tradukis la vikipedian artikolon pri la hospitalo al Esperanto; BEF donacis al ĉiuj paperan ekzempleron de la teksto. Vi povas elŭti ĝin de <https://benelukso.eu/zamfest2024/> kie estas ankaŭ ligilo al komuna fotaro kaj listo de aliĝintoj de la festo.



Pri la muzeo

Tiu antikva hospitalo datiĝas de la mezepoko kaj restis funkciinta ĝis 1980. Poste, en 2012, ĝi estis renovigita kaj transformita al muzeo. En 1242, Arnould IV, fortuna 60-jaraĝa senjoro, estis devigata partopreni en la milito. Pro tio, li faris testamenton, en kiu parto de lia posedaĵo estis – kiel kutime – rezervita por la malriĉuloj. Li tre rapide mortis, tiel lia edzino, Alix de Roisoit, heredis de konsiderinda fortune. Ŝi decidis investi en religia hospitala komunumo por lukti kontraŭ malsano kaj epidemio regantaj en la regiono, interalie provokitaj de la disvolviĝo de ŝtofa industrio.

Konklude, tiu loko vere valoras viziton pro diversaj kialoj: arkitekturo, historio, botanika ĝardeno, kolekto de pentraĵoj, medicinaj objektoj, kolekto de farmaciaj rimedoj, kaj tiel plu.

La tre agrabla nacia kunveno finiĝis per kafo kaj kuko. Denove belega memoro, eĉ se ni ne povis interparoli kun ĉiuj pro manko de tempo.

Eliane PIRONNET



Week-end d'apprentissage à Ypres

La studsemajnfino BEST estis granda sukceso!

Okazis Belga Esperanto-studsemajnfino (BEST) en De Iep en Ipro de 21/2/2025 vespere ĝis 23/2/2025 posttagmeze. Delonge tia kurso ne okazis en Belgio, do mi tre ĝojas pro la iniciato. Ĉeforganizis la semajnfino Piet Glorieux kun granda helpo de interalie An Olijslagers, Kristin Tytgat kaj Nicky Janssen.

Instruado

Alex Humet helpis al la komencintoj meti siajn unuajn paŝojn en Esperanto. Paweł Fischer-Kotowski per sia kurso celis tiujn kiuj jam iel elturniĝas en Esperanto, sed volas pliriĉigi sian konon kaj ekzerci sian parolkapablon. Lode Van de Velde helpis siajn kursanojn perfektigi sian lingvouzon en tri ŝtupoj: 1/ trovi, korekti kaj kompreni erarojn en tekstetoj; 2/ traduki poezion kaj 3/ mem verki, pere de instigiloj, poezion kaj/aŭ mallongajn rakontojn.

Mi mem venis ĉefe por inspiriĝi por mia propra instruado en Krikenhaar, kie de multaj jaroj Esperanto Nederland organizas studsemajnfinojn (vidu <https://mallonge.net/sts>). Paweł efektive multe inspiris min! Do mi ĝojas, ke mi estis en lia kurso. Li ĉefe instruis pri afiksoj kaj akuzativo. Ni ankaŭ ludis ludon: Tabuo. La instruado estis malsimpla por Paweł, ĉar la lingva nivelo de la partoprenantoj tre variis. Li bone

strukturite klarigis ĉion kaj donis klarajn ekzemplojn. Ĉefe gramatikon li bonege regas kaj sukcesis klarigi; estis agrable konstati, kiel Paweł scipovas la lingvon je denaska/universitata nivelo. Esperanto estas “pli facila lingvo”, sed tamen ne simpla. Eĉ mi mem pli profundigis mian lingvan konon; kelkaj ekzemploj de Paweł estis vere tre trafaj.

Paweł tre instige alvokis viziti la libroservon, kiun prizorgis FEL. Pluraj kursanoj pro tio aĉetis librojn. Organizantoj antaŭvidis grandan elekton; ili faris multe da peno kaj tio prave subtenindas. Gravas libroservo dum kunvenoj, interalie ĉar tiel eblas ŝpari sendokostojn kaj subteni niajn aŭtorojn kaj eldonejojn.

Distra programo

Vendredvespere grupo vizitis la Menenpoort por la Last Post (<https://lastpost.be/>), dum aliaj ludis sociajn ludojn aŭ muzikludis (ukulelo kaj fretocitro). De la komenco regis agrabla etoso.

Sabatvespere Lode kaj Nicky prezentis skeĉon surbaze de sloganoj de Movado sen Nomoj (MsN). Tio tre plaĉis al mi, ĉar mi maltrafis la feston de la 45-jariĝo. Mi registris la skeĉon

kaj alŝutis ĝin al la retejo de MsN (<https://esperanto.be/msn>), tiel ankaŭ multaj aliaj homoj povas ĝui ĝin. Johan Van Eenoo surprizis nin per prezento de propraj poemoj kombinite kun poemoj de famaj esperantistoj. Ĉiu partoprenanto ricevis bele enpaĝigitan ekzempleron de la BEST-poemaro. Poste en la trinkejo oni kune kantis kaj muzikis. Tio multe kontribuis al bona etoso. Multaj esperantistoj ŝatas kune muzikumi; eĉ tiom plaĉas, ke la lovena loka grupo Esperanto 3000 organizos la 1-an de majo Muziktagon! (<https://mallonge.net/muziktago25>)

Ejo kaj manĝoj

En la ĉambroj estis baza komforto, sed por mi tio sufiĉis. Estis nur iom da problemoj pri la hejtado: foje estis tro varme, foje tro malvarme en iuj ejoj. Tio tamen ne ege ĝenis.

La manĝo estis tre bongusta. Oni zorge atentis pri senglutenuloj, vegetaranoj ktp. Organizantoj petis helpon pri deĵorado en la trinkejo, ordigo de tabloj kaj lavado de teleroj kaj manĝilaro per maŝino en la kuirejo. Feliĉe ne mankis volontuloj por tiuj taskoj.

Konkludo

Venis ĉirkaŭ 35 homoj al la unua belga studosemajnfino. Tio estas tre bela rezulto. Ĉefe ĝojigis min, ke ĉeestis sufiĉe multaj franclingvaj belgaj esperantistoj, kaj eĉ kelkaj francoj. Du el tri instruistoj ne havis la nederlandan aŭ la francan kiel denaskan lingvon. Tio multe helpis por internaciigi la studsemajnfino.



Mi pensas, ke estus bone, venontfoje havi kvar nivelojn. La grupo de Lode estis ekzemple tre granda, kio iom malhelpis rapide progresi. Sed ĝenerale – almenaŭ laŭ tio kion mi eksciis kaj mem spertis – ĉiuj tre kontentis pri la tuta semajnfino.

Organizantoj de BEST 2025 planas denove okazigi ĝin en 2026. Oni hezitas, ĉu organizi ĝin denove en la flandra urbo Ipro, aŭ en la franclingva parto de Belgio. Ni vidos. Mi ĉefe esperas, ke la studsemajnfino iĝos jara tradicio!

Fotoj de la semajnfino aperas en la Beneluksa Bitarkivo. Tie vi povas ankaŭ trovi liston de partoprenintoj kaj kelkajn pliajn informojn. <https://benelukso.eu/best2025/>

Yves NEVELSTEEN

Rencontre de jeunes espérantistes

Belga Junulara E-Semajno en Ferrières

La Junulara E-Semajno (JES) estas novjara junulara esperantoarango kutime organizata de Pola Esperanto Junularo (PEJ) kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Ĝi okazas ĉiujare dum lastaj tagoj de decembro kaj unuaj tagoj de januaro, proksimume dum unu semajno, en iu loko en Meza Eŭropo. Laŭ formo, sed ne laŭ sezono, ĝi similas do al Internacia Junulara Kongreso. Ĉi-foje junaj belgaj esperantistoj organizis JES!

De la 27-a de decembro 2024 ĝis la 2-a de januaro 2025 okazis la 15-a Junulara E-Semajno (JES) en Bernardfagne, lernejo kaj internulejo de Saint-Roch Ferrières. Ĝi unuafoje okazis en Belgio. Organizis JES la Verdaj Skoltoj. Ĉeestis 149 partoprenantoj surloke el 29 landoj (se oni kalkulas Katalunion, Okcitanion kaj Skotlandon kiel unuopaj landoj).

Programo

Dumtage okazis pluraj profesiecaj spektakloj, multaj prelegoj, atelieroj, kursoj, ludoj, diskutrondoj, babilrondoj, kunsidoj kaj eĉ ekskursoj. Vespere okazis koncertoj, karaokeo, diskejo kaj trinkejo. Estis ankaŭ gufujo, silvestra balo kaj Internacia Vespere. Koncertis dum JES interalie La BaRok projekto (Rodrigo Carelli el Londono: drumisto,



Moyz el Brazilo: gitaristo, Muniz el Brazilo: basisto kaj kantisto, Rafael Milhomem el Brazilo: gitaristo, flutisto kaj kantisto), Ch0pstick kaj Mezbakita. Pluraj homoj faris filmetojn. Vi povas ilin spekti en la arkiva paĝo <https://mallonge.net/jes-24-25-arkivo>

La 182-a elsendo de la podkasto de Varsovia Vento temas pri JES. Irek intervjuis la organizan teamon; vidu la duan parton. <https://mallonge.net/vv-jes>

Yves NEVELSTEEN

Le poids de la rancune

La pezo de rankoro

Iam estis formiko portanta grandegan sovaĝan frukton. Survoje, skarabo baris ĝian vojon, mokante ĝian ŝarĝon kaj ĝian laboron. Ne estis la unua fojo, ke ĝi faris tion.

La formiko ignoris ĝiajn mokojn, ĉirkaŭiris la skarabon kaj daŭrigis sian vojon. Kelkajn tagojn poste, la skarabo trovis sin kaptita en la glueca rezino de arbo kaj vokis helpon.

Multaj bestoj, lacaj de ĝiaj moko kaj malbonaj moroj, ignoris ĝin. Tamen, la formiko donis al ĝi longan herbon, permesante al la skarabo liberigi sin de la rezino.

Dankema, la skarabo demandis al la formiko kial ĝi helpis ĝin, malgraŭ ĝiaj senĉesaj mokadoj. La formiko respondis: “Mi povas porti ĝis dudekoble mian propran pezon, sed estas unu tro peza ŝarĝo, kiun mi ne povas kaj ne volas porti: rankoron. Tial mi zorgas neniam lasi ĝin sur mia dorso, ĉar mi bezonas tiun spacon por porti aferojn esencajn por mia pluvivo”.

La skarabo, tre embarasita, tiam ŝanĝis sian sintenon. Ĉiam memoru, ke teni rankoron estas kiel kapti varman karbon kaj ne ellasi: vi estas tiu, kiu estas bruligita.

*Honoré SEBUHORO (honsebn@gmail.com)
el Norda Kivuo/DR Kongolando*



Le monde de l'espéranto

Novaĵoj el Esperantujo

Jarraporto de Belga Esperanto-Federacio

La estraro de Belga Esperanto-Federacio (BEF) volas per jarraporto doni superrigardon de la ĉefaj Esperanto-agadoj en Belgio. Belgaj esperantistoj estas aktivaj, sed la aktivuloj en la diversaj regionoj de nia lando ne ĉiam scias unu de la aliaj pri la planoj kaj realigoj de kluboj kaj unuopuloj. La raporto celas konigi la agadon de esperantistoj en Belgio, ankaŭ al interesitoj ekster nia lando, kiel la estraroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj asocioj en najbaraj landoj. Kvankam la raporto ne estas kompleta (nek celas esti), ĝi donas tamen ideon de la kvanto kaj diverseco de nia agado.

La raporto konsistas el tri ĉefaj partoj:

- Monata superrigardo de eventoj kiuj okazis en Belgio en 2024. Informoj estas ĉerpitaj de interalie Eventa Servo, de belgaj Esperanto-revuoj kaj de la Beneluksa Bitarkivo.
- Klarigoj pri Belga Esperanto-Federacio kaj UEA
- Informoj pri belgaj asocioj kaj lokaj grupoj

La raporto estas publika kaj vi povas libere elŭti ĝin de <https://mallonge.net/BEF-jarraporto-2024>

Papera versio estas aĉetebla ĉe estraranoj de BEF por 10 eŭroj.

Esperanto en Belgio 2024 - jarraporto



© bildo: Internacia Esperanto-Instituto

esperanto
Belgio

Kastelo de Grésillon, la Kulturdomo de Esperanto

Malgraŭ ĉiuj ŝanĝoj, kiuj anonciĝas sur nia planedo, aktivuloj de Greziljono kuraĝe daŭrigas sian agadon per la kutimaj kursoj: komence per la 13-a staĝo Printempas (<https://gresillon.org/p>) de la 18-a ĝis la 27-a de aprilo, kie ili esperas vidi multajn el ni.

La grandega projekto ripari ĉiujn tegmentojn de la kastelo kaj ĝiaj kromdomoj estas preskaŭ finita: la konstrulaboro rekomenciĝis en decembro, kun proksimume dujara malfruo (pro manko de laborforto ĉe la tegmentisto). Restas triono de la tegmento de la kastelo por anstataŭigi kaj 15% de la tuta kosto por pagi, sed repago de la prunto lanĉita en 2021 efektive komenciĝis en la promesita dato, la 31-an de decembro 2024. La Jarkunsido, per 70% de balotintoj, voĉdonis favore al intensigo de komerca agado kaj serĉado de klientoj ekster semajnfinoj. Pierre Soubourou estis elektita Prezidanto kaj la Komitato aprobis, pli bone adapti nian strukturon al niaj komercaj celoj, profesian ekspertizadon, kies unua fazo komenciĝis.

Sed la Kastelo de Grésillon restas antaŭ ĉio la Kulturdomo, kaj multajn okazojn vi povos ĝui por tie lerni kaj praktiki Esperanton. Profitu, ekzemple, la Francan Esperanto-Kongreson (<https://kongreso2025.esperanto-france.org>) en Nantes (7-9 junio) por aliĝi al la postkongreso en Greziljono (9-13 junio) kaj viziti plurajn famajn kastelojn en la



ĉirkaŭaĵo. Venu kaj ĝuu iliajn multajn agadojn gvidatajn de instruistoj el diversaj landoj sed parolantaj nian komunan lingvon: Esperanto.

Jen la lasta filmeto, kiun oni muntis por la
Virtuala Kongreso 2024 de Universala Esperanto-Asocio:
<https://mallonge.net/g-filmeto>

François LO JACOMO

*Vicprezidanto de la
Kulturdomo de Esperanto*

Homonymie et quasi homonymie

Homonimoj kaj paronimoj en Esperanto

On parle d'homonymie, quand un même mot peut avoir deux sens essentiellement différents. On trouve en français de nombreux homonymes, par exemple : temps, langue, verre, mousse, moule, rame, etc

L'espéranto a essayé dans la mesure du possible, pour lever toute ambiguïté, d'éviter les homonymes. Ainsi, suivant le sens, temps se traduit par 'tempo' (durée) ou 'vetero' (climat), langue par 'lingvo' (parler) ou 'lango' (organe), verre par 'vitro' (matière) ou 'glaso' (boisson), mousse par musko (végétal) ou 'ŝipknabo' (jeune matelot) ou ŝaŭmo (écume), moule par 'mitulo' ou 'muldilo' (outil), rame par 'remilo' (navigation) ou 'rismo' (rame de papier).

Mais, ce n'est pas toujours le cas, et on trouve aussi en espéranto quelques véritables homonymes : 'Belo' = (la beauté) et le 'belo', unité sonore et surtout 'decibelo' (le décibel).

On parle de quasi homonymes (plus justement de paronymes) quand des mots qui se ressemblent à une ou quelques lettres près, ont des sens très différents. Souvent, ils diffèrent d'une seule voyelle ou d'une consonne. Et il faut bien remarquer que cela peut parfois

poser des problèmes pour les mémoriser, ou lorsqu'on s'exprime, en se trompant du sens exact du mot.

Le cas le plus souvent cité est celui des verbes 'pezi' (avoir un poids donné : intransitif) et 'pesi' (mesurer le poids d'un objet : transitif). Ainsi 'pesilo' est une balance et 'pezilo' est un objet marqué d'un poids qu'on met sur une balance). Bonvolu noti: 'Tiu persono pezas 60 kilogramoj' et 'mi pesas tiun pakaĵon por scii ĝian pezon'.

Mais tout le vocabulaire de l'espéranto regorge de tels paronymes ! Dans Vikipedio, on peut trouver une longue liste incomplète de 81 groupes de tels mots. (Vidu <https://eo.wikipedia.org/wiki/paronimo>). Il n'est évidemment pas question ici de les citer tous. Choisissons quelques cas intéressants :

- 'Serĉo' (Recherche) ; 'Ŝerco' (Blague) : Oni povas serĉi kie estas la ŝerco en tiu frazo !
- 'Ŝargi' (Charger une batterie) ; 'Ŝarĝi' (Charger pour le transport).
- 'Senso' (un de nos 5 sens) ; 'Senco' (signification) ; 'Sento' (sentiment). Bonvolu noti: sencumo (direction).

- 'Polvo' (poussière) ; ' Pulvo' (poudre explosive) , et donc 'polvero' (grain de poussière).
- 'Tabulo' (plaque) ; 'Tabelo' (support contenant des données). 'Tablo' (meuble) ; 'Tabo' (Tabulation)
- 'Krano' (robinet) ; 'krado' (grille) ; 'Kreno' (raifort) ; 'Kranio' (crane)
- 'Plado' (Plat de nourriture) ; 'Plato' (partie plate) ; 'Pleto' (plateau pour le service) ; 'Pledo' (plaidoirie)
- 'Humuro' (humour) ; 'Humoro' (humeur)
- 'Gazo' (Gaze – tissus) ; 'Gas'o' (gas)
- 'Gliti' (Glisser) ; 'Glisi' (Planer)
- 'Kalo' (callosité) ; 'Kolo' (cou, col) ; 'Kulo' (moustique) ; 'Kilo' (Quille de bateau, mais aussi préfixe : kilo-gramo)
- 'Pico' (pizza) ; 'Pizo' (petit pois) ; ' Piĉo' (mot vulgaire pour la vulve) ; ' Pigo' (pie) ; 'Piso' (urine)
- 'Kaso' (caisse d'argent) ; 'Kaŝi' (cacher) ; ' Kaco' (mot vulgaire pour le pénis) ; ' Kaĉo' (purée)
- 'Puso' (pus) ; 'Puŝo' (poussée) 'Poŝo' (poche) ; 'Puĉo' (putsch) ; 'Pugo' (le postérieur)
- 'Balo' (bal) , 'Belo' (la beauté et l'unité Bel) ; 'Bolo' (ébullition) ; 'Bulo' (boule) ; 'Bilo' (titre boursier).
- 'Beko' (bec) ; 'Boko' (bouc animal) ; 'Buko' (boucle) ; 'Baki' (cuire)
- 'Kivo' (kiwi fruit) ; 'Kivio' (kiwi oiseau) ; 'Kavo' (cavité) 'Kuvo' (cuve)
- 'Kazo' (un cas), une circonstance) ; 'Kuzo' (cousin) ; 'Kiso' (baiser)
- 'Adolto' (adulte) ; 'adulto' (adultère) : la adolta adulto !

Claude GLADY



Ekzemploj de paronimoj el la verko Konfuziloj
<http://retbutiko.be/eo/ero/kfuz>

Inspiraj rakontoj

Du fratoj

Jen estas rakonto pri du fratoj. Unu estis drogulo kaj ebrulo kiu regule batis sian edzinon kaj infanojn. La alia estis tre sukcesa komercisto, respektita en socio kaj kiu havis ĉarmajn edzinon kaj infanojn. Kelkaj homoj volis scii kial la du fratoj, kiuj devenis de la samaj gepatroj kaj grandiĝis en la sama hejmo, povis fariĝi tiel malsamaj.

Oni demandis la unuan: “Kial vi estas tia? Vi estas drogulo, ebrulo kaj vi batas viajn edzinon kaj infanojn. Kio motivigas vin?” “Li respondis: “Mia patro.”

Ili demandis, “Kio pri via patro?” La respondo estis: “Mia patro estis drogulo kaj ebrulo kiu regule batis sian edzinon kaj infanojn. Kion vi volas ke mi fariĝu? Jen tia kia mi estas.”

Ili iris al la alia frato kiu estis pli sukcesa kaj faris la saman demandon. “Kial vi estas tia? Kial vi estas sukcesa kaj havas feliĉajn edzinon kaj infanojn? Kio motivigas vin?” Kaj diveni kion li respondis? “Mia patro.”

Li daŭrigis: “Kiam mi estis eta knabo, mi ofte vidis mian patron ebria kaj farante malbonajn aferojn. Mi decidis, ke mi ne volus vivi tiel.”

Ambaŭ ĉerpis siajn fortojn kaj motiviĝojn de la sama fonto, sed unu uzis ĝin negative kaj la alia pozitive.

Pri la ĉielo kaj la infero

Granda, forta samurajo vizitis malgrandan monaĥon. “Monaĥo”, ordonis li en tono kiu ne toleris kontraŭdiron, “instruu al mi pri la ĉielo kaj la infero!”

La monaĥo suprenrigardis al la danĝeraspekta batalanton kaj respondis kun la plej eble granda malestimo:

“Instrui al vi pri la ĉielo kaj la infero? Mi povus instrui al vi nenion. Vi estas malpura, vi stinkas, via glavo estas rusta. Vi estas hontomakulo kiu embarasas la klason de samurajoj. Iru for. Mi ne povas elteni vian ĉeeston.”

La samurajo furioziĝis. Li tremis, fariĝis ruĝa en la vizaĝo kaj mutiĝis pro kolero. Li elingigis la glavon, levis ĝin supren kaj pretiĝis por bati la monaĥon. “Tio estas la infero”, diris la monaĥo trankvile.

La samurajo estis perpleksa. La kompatato kaj konfido de tiu ĉi eta viro kiu riskis sian vivon por montri al li la inferon!

Malrapide, li subenigis sian glavon, plena je dankemo kaj subite pacema.

“Jen la ĉielo”, diris la monaĥo.

Eltirita de « Inspiraj rakontoj » – tradukis Lode Van de Velde – Eldono: Movado sen Nomo, 2015. <https://esperanto.be/msn>

V.Esp-o dispone d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Gladly.

Renseignements : cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi - <https://esperanto.be/charleroi>

Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032
Mont-sur-Marchienne. Pour y participer:
Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

Eghezée Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

Huy Philippe Draize - philippedraize@yahoo.fr

Liège - <https://esperanto.be/liege>

Eric Nemes - eric.nemes@gmail.com
0494 230 234

Namur Cours à l'UTAN tous les vendredis à
13h30. Jean Annet jean.annet@gmail.com

Tables de conversation :

Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262 20 64
<https://mallonge.net/td>

Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

Bonvenon al Schleiden (DE)

Gebeneluksa Kongreso 2-5 okt. 2025

Jam eblas aliĝi! La komuna germana-beneluksa kongreso okazos en Germanio, je 30 km de Monschau, proksime de la landlimo kun Belgio.

Temo: translime

Programo kaj aliĝilo
<https://benelukso.eu/kongreso>



© D. Ketz - nationalpark-eifel.de

Autres personnes ressources

- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Gladly 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Lobbes : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !


L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52



6540-dépôt
lobbes
P001014

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes